

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1978



22a Jarkunveno de GEFA en Bremen



Roland antaŭ la urbdomo

foto: Verkehrsverein Bremen

Serenaj tagoj kaj gajaj homoj

22a Jarkunveno de GEFA en Bremen 6. — 8. Oktobro 1978

„Nenion por kritiki“ laŭdis eminenta partoprenanto en la 22a Jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio. Sed vere la 216 GEFA-membroj, gastoj kaj reprezentantoj el naŭ landoj ĝuis malstreĉigan semajnfinojn dank' al la glata fluo, akurateco kaj afabla zorgumo pro perfekta preparlaboro de H. D. Hartig kun la bremena grupo. Jam la akcepto sur la kajo de la fervoja stacio okazis senprobleme, ĉar imitinde ĉiu aliĝinto sufiĉe frue antaŭ la okazo ricevis hotel-adreson kaj programkajeron kun utilaj informoj. Kurieroj kaj helpantoj zorgis, ke dekomence ĉiuj sin sentis hejmece.

Jen la raportanto en krajononmaĉiga embaraso, ĉar li preskaŭ nenion el la programeroj povis mem ĉeesti, ne pro malintereso, sed pro la ĝojiga fakto, ke en Bremen denove okazis ekzamenoj. Kun tre diferenca poentonombro tamen ĉiuj ses kandidatoj sukcese trapasis ilin.

Ankoraŭ vendredon ĉiu interesulo povis partopreni sperte preparitan kaj bone vizitatan informvespero. En sia enkonduka referaĵo Rolf Grebe antaŭ ĉ. 45 personoj skizis vojon kaj utilon de la Internacia Lingvo; li prezentis i. a. impresajn ciferojn pri kostoj pro lingva diverseco en la internaciaj institucioj. Kolegoj el kvin lingvaj teritorioj poste demonstrib praktikan interlingvismon diskutante pri la ekonomia situacio de la fervojoj. Taŭge kompilita ekspozicio dokumentis la uzadon de Esperanto sur ĉiuj niveloj en tutmondo.

Menciindas la preskaŭ ne bremsebla scivolemo de multaj gejunuloj el la publiko, kio esperigas ĝermantan intereson precipe inter junaj homoj. Ankaŭ la progresoj de Germana Esperanto-Junularo en la lastaj kvin-ses jaroj eble signalas, ke ni direktu nian specialan atenton al homoj, kiuj frustritaj de trosateco pri nia abundisma socio serĉas pli valorajn idealojn.

Alia grupo da vizitantoj decidis iri kun la vespera promenado tra la historia centro de Bremen. Kiel kutime de jaroj, ankaŭ ĉi-vespere oni finis la unuan tagon inter agrabla rondo en tipe malnova restoracio.

Pri tiu ĉi babila kunveno en la bierfarejo Alt Bremer Brauhaus oni aŭdis, ke ili tamen ne volonte vendis sian valoran bieron.

Pli frue ol la programo indikis, GEFA-estraro kaj komisiitoj devis komenci la sabatan kunsidon. La ampleksa tagordo ankaŭ ĉi-foje ne povis esti fintraktata. Bonvena gasto estis sinjoro Bayerath de ĉefestraro BSW, kiu siaflanke atente sekvis kaj kundiskutis. La kunveno traktis administrajn kaj organizajn problemojn ankaŭ de la internacia movado, priparolis preparojn por la IFEF-kongreso kaj diskutis novajn varbideojn. Sonbild-kolekto estas preparata kaj konkurso por varbantoj planita.

Al Heilbronn en distrikto Stuttgart kolego Krüger invitas la 23an Jarkunvenon por la semajnfino 5. — 7.10.1979. La 24a GEFA-Jarkunveno 1980 supozeble okazos en Oberkirch (BD Karlsruhe).

Sinjoro Bayerath uzis la konvenan okazon por aprezi la meritojn de prezidanto Gießner en 30-jara honorofica agado por la sociala kaj kultura organizaĵo de germanaj fervojistoj BSW. Jam pli ol 25 jarojn li laboras en tiu medio por la Internacia Lingvo kaj lian Esperantobiografion oni legas kiel historion de GEFA, kies evoluon ekde la 4a IFEF-kongreso en Lindau li almenaŭ grave kundecidis kaj direktis kiel sekretario, redaktoro, prezidanto kaj en nenombreblaj aktivecoj. La ĉefestraro de BSW transdonis dankon, gratulojn kaj jubilean donacon.

Dum la samaj antaŭtagmezaj horoj kvar grupoj piede sekvis la bremenajn gvidantojn tra la historia urbcentro. Jen Roland, la domina statuego gardanta la liberan merkaton de la Hanso-urbo, iama membro en tiu komerca ligo; jen la fama Böttcher-strato, ne la sola elemento, kiu legitimas la urbon kiel kulturalan centron; laŭlonge de la Weser-rivero, signifoplana por trafiko kaj komerco de Bremen; tra la Schnoor-kvartalo, antikva domaro el la pasinta jarcento kaj pli aĝa; fine preter la borsejo al la katedralo kaj denove ĝis la origine gotika urbdomo kun belega renesanca ĉeffasado.

Honora protektanto de la jarkunveno estis registarano Oswald Brinkmann, senatoro por ŝipado, havenoj kaj trafiko. En la urbo-ŝtatoj Hamburg kaj Bremen la registaro estas nomata senato; la ofico de senatoro respondas do al tiu de ministro. Senatoro Brinkmann esprimis siajn simpatiojn al nia afero dum akcepto, al kiu Bremen estis invitinta, pro kio prezidanto Gießner diris varman dankon transdonante memordonacon.

Saman tagon ankaŭ Nordgermana Esperanto-Ligo havis sian konferencon en Bremen. Pri ĝi oni povos legi detale en la Bulteno de Germana Esperanto-Asocio. La GEFA-ekspozicio ne havis tre taŭgan lokon; tie ĝi apenaŭ povis atingi interesiĝotan publikon. Cetere montriĝis, ke ĝi nepre bezonas restaŭradon kaj aktualigon. Librostando ekipita de dana Esperanto-Centro trovis bonvenan akcepton.

El nebulopala mateno ruĝis la sunĝlobo kaj belegan aŭtunan posttagmezon aŭguris. Piedpilkado de la famaj teamoj Werder Bremen kontraŭ Bayern München estis okazonta sur la sama riverinsulo, kie situas ankaŭ la kunvenejo Kuhhirten; tamen ne malbone, ke la minaco de futbaltrafika ĥaoso rapidiĝis la forveturon de la ekskursautobusoj. Por naturamiko kaj artamanto estis malfacile, decidi inter du ekskursproponoj al Worpsswede. La migremuloj havis gajan promenadon ĉirkaŭ Weyerberg, kun ekzakte 57 metroj sm la plej alta monto en vasta ebenaĵo inter marĉo, maro kaj erikejo. Tra pinarbaroj kaj sablozaj, flakoplenaj vojoj ĝoje kantante marŝis grupete la ekskursantoj.

La artamuloj jam dumvojaĝe rivevis iom pli detalajn informojn pri topografio de la pejzaĝo, historio de la regiono kaj evoluo de la artista vilaĝo Worpsswede. La nomoj de la gepentristoj Fritz Mackensen, Otto Modersohn, Paula Becker, Heinrich Vogeler, la skulptistino Clara Westhoff, la poeto R. M. Rilke, la arkitekto kaj skulptisto Bernhard Hoetger, la granda mecenato Roselius al tiu ĉi, antaŭ 100 jaroj ankoraŭ signifa marĉkolonio donis signifoplenan mondfamon.

Tute nekutime, sed ĉarme kaj konvene la folkloraj junul-orkestro G. Espitalier per fremdlandaj instrumentoj enkondukis kaj kadrumis la salutvesperon kun melodioj rumana, portugala, jugoslavia, hungara,

rusa kaj bohemia. Prezidanto Gießner povis saluti la estron de BSW Hannover, direktoron Böhm kaj senatoron Brinkmann. Li dankis al la distriktkomisiito Werner Heimlich, al la loka organizanto Heinz Dieter Hartig kaj al la diligentaj bremenaj helpantoj pro la organizado de la jarkunveno. Por la sindikatoj GDBA kaj GDL sinjoro Kutschera kaj sinjoro Fuhrmann persone bondeziris. Parolis sinjorino Bormann kiel prezidanto de Germana Esperanto-Asocio. Sinjoro d-ro Werner Bormann reprezentis la Universalan Esperanto-Asocion. Por IFEF Wim van Leeuwen trovis afablajn salutvortojn. Leterojn sendis kolegoj Rebiček, Labordus, Barks kaj sinjorino Majorie Boulton: „ . . . ne fordesu la katojn, la musojn kaj la akuzativon!“ Post paŭza folklormuziko sin prezentis la reprezentantoj de la najbaraj fervojistaj asocioj. K-go Scharf por Aŭstrio, k-go De Sutter por Belgio, k-go Raplay por Britio, Astrid Birkbak por Danlando, k-go Mazaŭd por Francio, k-go van t' Hoog por Nederlando, k-go Bengtsson por Svedio, kaj por Svislando kolego Kurt Greutert, kiu ĉi-okaze invitis al la 64a Universala Kongreso en Luzern.

Fine la dancemuloj estis kontentigitaj de modernmuzika unuvira orkestro Korek. Sed vere orkestre tiu akompanis la festan balon ĝis la 2.00 h matene. Jam de la 23.00 h regule veturadis autobusoj de la fora Werder al la urbcentro.

Dimanĉon matene oni denove akurate veturigis la gastojn al la ĉefa kunvenejo Kuhhirten sur la riverinsulo. Paralele al la tradicia matineo, en eble tro malgranda konferenc-ĉambro okazis la parola parto de la lingvoekzamenoj. La publika intereso estis atentinda. La jarraporto de la prezidanto pri la pasinta administra jaro aperas aparte. Film prezentado pri la venontjara jarkunveno de GEFA post pluraj provoj domaĝe fiaskis, sed disdonitaj prospektoj detale informis pri Heilbronn. Kolego Barnickel montris sian, kun granda aplaŭdo akceptitan sonfilmon pri la ĉi-jara IFEF-kongreso en Romo.

„Por la Prospero de Bona Espero“ sinjorino Kruse kelkajn semajnojn pasigis en Brazilo por aktive helpi al niaj geamikoj en Alto Paraiso. Montrante siajn dia-pozitivojn kun trafaj scenoj el la ĉiutaga vivoluktado en Bona Espero ŝi pasie kaj

konvinke pledis pri ĉiuspoca helpo: preskaŭ ĉiajn objektojn oni povas utiligi tie; ankaŭ mono estas bonvena; sed plej grave estas homoj, kiuj pretas akcepti la simplan vivon, kiuj helpas kulturi la kampojn kaj eduki la infanojn. „Streĉa vivo, sed feliĉiga“ diris Elfriede Kruse pri sia aktiveco en Bona Espero. La profunde impresitaj aŭskultintoj spontanee kolektis preskaŭ 280 markojn kaj notis la novan adreson por eventualaj varsendaĵoj:

Fazenda Escola Bona Espero,
Fam. Grattapaglia, SQS 204 Bloc H,
Ap 204, Caixa Postal 04-0097,
BR - 70 000 **Brasil**.

Kiel kritike ni analizu la rikolton de nia jarkunveno? Dank' al la helpo de la direkcia gazetara servo Hannover 4 gazetoj kaj Radio Bremen plurfoje raportis. La diskuto pri nia situacio daŭras inter GEFA-anoj. La raportanto ne volas paroli pri forte rimarkebla ŝanĝiĝo de danĝera tendenco. Ni almenaŭ ne plu paralizite rigardas la „ŝrumpstagnadon“. Novaj ideoj burĝonis kaj atendas realigon. Nekompreneble en hodiaŭa tempo, kiam mizero kaj malriĉego estas preskaŭ nekonataj vortoj ĉilande, oni povas disputi pri kelkaj spezoj da jarkotizo.

Marĝene ni ekscias, ke post la jarkunveno 20 kursanoj el Bremen komencis lerni la Internacian Lingvon. Al niaj gastigintoj gratulon kaj dankon!

wbr

Sukcesaj ekzamenoj en Bremen

Dum la 22a Jarkunveno de GEFA kvar kandidatoj, la sinjoroj Feilke, Grebe, Papenfuß, Ullmann sukcese partoprenis la ekzamenon pri lingva kapableco.

Du kandidatoj, sinjoro Menzel kaj la 10-jara Maren Grebe sukcesis en la kursfina ekzameno. Komisaroj de la Germana Esperanto-Instituto: Lautenbach, Ritter-spach, Brandenburg.

GEFA kore gratulas al la diligentuloj pro persisto kaj kuraĝo!

Skuaj ciferoj, skuaj vortoj

En la matineo la prezidanto denove trovis dankvortojn por LKK, sed ankaŭ por la partoprenantoj, kiuj per sia precizeco konsiderinde kontribuis al la akurata funkciado de la jarkunveno. La prezidanto laŭtlegis la nomojn de la mortintoj el la pasinta jaro, kiujn la ĉeestantoj honoris starantaj. Poste li anoncis, ke la Federacia Fervojo reklamos en la UEA-jarlibro 1979 per tutpaĝa anonco, denove post longa tempo.

La sekvontan raporton de la prezidanto ni jen publikigas vortvorte:

Ni ne faru longajn vortojn pri nenio, sed ni elprenu du faktojn, du ciferojn, el la jarraporto: unue, la nombro de niaj individuaj membroj reduktiĝis dum la pasinta jaro de 526 al 504 = minus 4,2%. El tiuj 504 estas 165 emerituloj, rentuloj, familianoj, tio estas 33%. Tio klare montras, ke la membroperdoj estas esence pli altaj ol la membrogajnoj. Alia menciinda cifero: komenciĝis 5 kursoj en la jaro 77, pri kies rezultoj oni ne povas ekscii ekzaktajn indikojn. Tiuj faktoj: unuflanke membroregreso, aliaflanke tro malmulte da kursoj karakterizas evoluon, pro kiu mi jam de jaroj avertis en ĉiu jarkunveno, kiu tamen nun atingis staton ne plu tolereblan.

Mi ĵus nun faris tion, kion la raportinto pri la pasinta jarkunveno en Bulteno 5/77, nia amiko Brandenburg, akuzas: „Lamente mi konstatas la malpliigon de la membro-nombro.“ Alialoke li diris: „... perdiĝis ĝermoj sur nefekunda grundo, tie kie ni ne sukcesis aktivigi kapablajn kulturistojn. Ĉu la lokaj grupoj ankoraŭ estas la spino de la movado?“ (fino de la citaĵo). Li ankaŭ konstatas, ke kelkaj grupoj aŭ asocioj „nekreble kreskas kaj prosperas“, „kiujn fenomenojn“ — mi denove citas — „rezultigas ne mirakloj, sed sole persisto, diligento kaj senfine sindona laborado“.

Kol. Brandenburg daŭrigis menciante la studojn de nia amiko Hartig, kiu kiel kvintesenco donis al ni sian verkon „aktivu — progresu“. Kaj sekvas la frazo: „Ĉiuj formoj kaj metodoj de organizo kaj informado povas esti je dispono al funda diskuto.“

Kaj mi citas ankoraŭ finajn vortojn el tiu tre bona raporto el Bulteno 5: „Saarbrücken valoris, se ni kuraĝas pripensi novajn paŝojn, meti respondecon kaj laboron sur la pli vastan bazon de la lokaj societoj kaj kapablas plivigligi la grupan aktivecon.“

Mi dankas al Brandenburg pro tiuj klaraj konstatoj. Li trafte priskribis la kaŭzojn de nia regreso kaj same trafte la necesajn paŝojn. Kaj jen la punkto, kie ĝis nun estas abismo sen ponto inter kuraĝa volo, teoria ekkono unuflanke kaj la sobra realeco aliaflanke. Ni ja rimarkis la situacion, ni jes jam kelkfoje diskutis ĝin, ni jes almenaŭ proksimume ekkonis la vojon irendan. Sed ĉiam, kiam temas pri la plej grava, nome pri la homoj, kiuj plenigos la diskutitajn ideojn per vivo, tiam oni staras antaŭ la fama muro el kaŭĉuko. Oni povas premi kie oni volas, la kaŭĉuko ne reagas. Tio volas diri, ke ĉiuj ĝisnunaj klopodoj de la estraro fiaskis, ĉar krom malmultaj membroj, kiuj jam ĉiam sur siaj lokoj savis la ĝisnunan ekziston de GEFA, neniu pretas, disponigi iom da siaj fortoj por retiri la asocion el la maĉo de stagnado kaj regreso. Kutime oni aŭdas, ke deĵoraj aŭ personaj, familiaj kaŭzoj ne permesas eĉ plej etan kunlaboron por la asocio. Sed ni estu honestaj: Kiu el ni ne havas deĵorajn aŭ personajn kaŭzojn, kiuj ne iamaniere limigas lian tempon, streĉas liajn nervojn? Sen ia ajn dubo en niaj vicoj estas sufiĉe da kapabluloj, kiuj povus plenumi la kondiĉojn nomitajn de Brandenburg. Sed la estraro estas senpotenca sen la bonvolemo de tiuj kapabluloj. Tiaj kapabluloj estas inter vi, kiuj troviĝas tie ĉi en la salono same kiel inter niaj aliaj membroj.

Mi laboras en la GEFA-estraro seninterrompe de 25 jaroj. Sed neniam la indiferenteco de nia membraro kaj precipe de tiuj, kiuj povus helpi, se ili nur volus, estis pli forta ol nun en tiuj jaroj, kiam ni ĉiuj persone pli bonfartas, kiam ni ne havas salajrajn plendojn, kiam ni havas pli da libera tempo. Sed evidente ĝuste en tiu stato de persona bonfarto radikas la nepreteco.

Kiam vi en tiu Bulteno legos la kondiĉojn por konkurso, kiun ni aranĝos por plialtigi la membronombron, mi kompreneble esperas, ke la tuta membraro ekkonos la

sinceran neceson de tiu konkurso kaj amase partoprenos. Ne pro la premioj, sed por helpi al nia komuna afero. Tamen jam nun mi akcentas, ke neniel helpos ŝajna gajo de nur tiaj membroj, kiuj ja pagos kotizojn por certa tempo por poste denove forlasi nin, kvankam ni ne forpeli simpatiuojn. Tamen, ĉefe ni bezonos verajn interesulojn, kiuj restos en niaj vicoj. La lokaj societoj, eĉ unuopuloj nepre aktiviĝu, organizu kursojn, cerbumu pri ideoj, kiel laŭ lokaj cirkonstancoj eblos altiri novajn adeptojn kun la fina celo, teni ilin en nia rondo. Nia amiko Hartig donis al ni tiun vere bonegan helpilon „Aktivu — progresu“. Aĉetu ĝin ankoraŭ hodiaŭ, se vi ne jam havas ĝin. Ĝi donas al vi multnombrajn konsilojn, kiujn vi ĝuste nun urĝe bezonos. Ni, nia organizaĵo volas vivi. Sed ni nur povos vivi, kiam finfine ĉesos tiu ĝenerala sintenado, mem nenion fari, ĉar ja kelkaj „stultuloj“ ofertas sin kaj zorgas, ke la ĉaro ĉiam denove estu tirata el la ŝlimo. La danĝero kreskas, ke tiuj „stultuloj“ perdos la emon. Ĉu iu tion volos? Certe kaj espereble ne. En la venonta jarkunveno — kaj unu jaro estas mallonga tempo! — ni vidos la rezulton. Vi ĉiuj kaj la tuta membraro havos en viaj manoj la sorton de nia asocio GEFA.

Jarraporto

pri la periodo de la 21a ĝis la 22a jarkunveno (1977 — 1978)

Unue ni honorigas la membrojn, kiujn forprenis la morto. Ili estas:

Franz Xaver Erhard,
Ernst Abt,
Franz Lang kaj
la edzino de Alfrid Lemme,
Hedwig Lemme.

Ni ne forgesos ilin.

Organizaj aferoj

Por 1978 GEFA pagis al IFEF por individuaj kaj korporativaj membroj 821 kotizojn, sekve denove rajtas havi 5 komitatanojn. La nombro de individuaj membroj reduktiĝis de 527 al 504. Tio estas plej klara pruvo, ke nek la nombro de la kursoj, nek la postkursaj klopodoj sufiĉis, por egaligi la membraperdon. La kotizo restis la sama — 9 GM jare — entute ridinde malalta sumo, kaj des pli, kiam oni konsideras, ke la kontraŭvaloro de 12 danaj kronoj estas pagenda al IFEF.

Ĉar la IFEF-komitato en Romo ne akceptis proponon por kotizplialtigo, ankaŭ la GEFA-kotizo spite al la daŭra inflacio povis resti por la venonta jaro.

Personaj ŝanĝoj

La unuan de Januaro la ofico de la distriktkomisiito por Essen transiris de kol. Bartz al kol. Manfred Retzlaff.

La **laborkonsilantaroj** kunvenis en Saarbrücken (Oktoebro) kaj Frankfurt (Aprilo) kun la distriktkomisiitoj.

Kursoj

En 1977 komenciĝis nur 5 kursoj, nepre tro malmultaj. Ni ne povos kontentige vivteni la asocion, se ne kaj la nombro de kursoj kaj la nombro de finlernantoj konsiderinde povos esti plialtigitaj. La finlernintoj estos kvazaŭ niaj adeptaj „enspezoj“, kiujn ni devos aldoni al la kapitalo. Nur tiu vojo kondukos al la dezirita rezulto, nome al reprospero de GEFA.

Kunlaboro en IFEF

La Eterna Urbo allogis 85 germanajn kongresanojn al la 30a IFEF-kongreso. Estis tie reelektitaj la germanaj membroj Gießner kaj Kruse kiel prezidanto resp. sekretariino de IFEF. Reprezentis GEFA la komitatantoj Brandenburg, Graß, Hans Müller, Ritterspach kaj Schrapp en la kongreso. La fakprelego estas tradukita. La tradukaĵon ricevis i. a. la Dokumenta Servo de DB kaj kelkaj fakaj lernejoj.

La internacia komunikilo „Terminara Kuriero“, fondita kaj daŭre redaktata de kol. Hartig, pli kaj pli trovas pozitivan eĥon inter la kreskanta nombro de kunlaborantoj de la Terminara Komisiono. GEFA partoprenis en du kunvenoj de tiu komisiono en Nederlando resp. Belgio.

Kontaktoj, aranĝoj

La 21a jarkunveno okazis de la 7a ĝis la 9a de Oktoebro 1977 en Saarbrücken. Partoprenis 105 membroj kaj 18 eksterlandaj gastoj el 4 landoj. Dum la sabata vespero ĉeestis pli ol 170 personoj. La publika eĥo bedaŭrinde ne estis tro favora pro diversaj mankoj kaj malhelpoj dum la preparado kaj aranĝado. La jarkunvenon ĉeestis kol. Bayerath, Frankfurt/M., kiel reprezentanto de la BSW-ĉefestraro. Kiel kutime GEFA-anoj multnombro vizitis ankaŭ aliajn Esperanto-aranĝaĵojn, ekz. la UK

Varna, la GEA-kongreson, feriosemajnojn, seminariojn ktp.

GEFA organizis de la 11a ĝis 18a de Februaro 1978 la internacian **IFEF-skisemajnon** en Grainau „Haus Hammersbach“. Multege da neĝo favoris la partoprenantojn el 7 landoj.

La kutimaj kontaktoj kun BSW, GEA, GEI, IEMW, kaj la fervojistaj sindikatoj daŭre bone funkcias.

Sendube meciindas, ke kelkaj lokaj grupoj kaj unuopuloj de jaroj, sed lastatempe eĉ pli intensive, evoluis fruktodonajn kontaktojn al la infanvilaĝo „**Bona Espero**“ en Brazilo. Multaj pakaĵoj kaj vestaĵoj kaj bezonata materialo jam estas senditaj kaj malavare mono kolektita diversokaze. Kol. Elfriede Kruse lastsomere dum du monatoj studis surloke, tie kunlaborante, la situacion en Bona Espero.

Informado

„Bulteno“ aperis kvinfoje kun 40 paĝoj kaj 9 bildoj. Kiel jam ek de 1975 daŭras la malagrabla stato, ke krom en la entreprena revuo „Wir“ ne eblas publikigi ion pri nia agado en fervojista medio. Tio estas des pli bedaŭrinda, ĉar la superpezo de la amaskomunikiloj mortbatas ĉiajn informojn, kiuj ne konvenas al iliaj „direktivoj“, kutimoj kaj ideologia sintenado. Tamen ni agnosku, ke la revuo „Wir“ eĉ petis de ni raporton, kiu tamen en tute alia formo aperis.

En la oficialaj porfervojistaj komunikiloj (Amtsblätter) ni konstatis 12 publikigaĵojn, en la ĝenerala gazetaro minimume 114 artikolojn kaj notojn pri nia laboro. Kongresrezolucio ĉi-jare ne ekzistis. En kelkaj urboj estis prezentita la migra ekspozicio por entute pli ol mil vizitantoj. Krome diversloke estis aranĝitaj Zamenhof-festoj, koncertvespero, sorĉvespero, senceremoniaj kunestadoj, apartaj publikaj informadoj ktp. Ni nomu speciale la grupojn en München, Frankfurt, Herzberg, Schwelm kaj Bremen, riskante forgesi iun. Kelkaj mil informiloj resp. afiŝoj estis utiligitaj. 98 lernobibroj ekstere de la kursoj estas venditaj, bona rezulto. Tamen ĝi ne montriĝas en la membro-nombro.

Arkivo

Dum multaj jaroj jam preskaŭ sekrete,

sed fidinde, laboras kol. Barmaneter por GEFA. Konstante li kolektas la al li senditajn gazeteltondaĵojn, fotojn, raportojn do ĉiun materialon, kiu havas dokumentan valoron. Lia adreso ĉiujare troviĝas en Bulteno n-ro 1. lasta paĝo.

Emerituloj

Post lastjara kunveno en Ulm la emerituloj ĉi-jare estis kunvokitaj al sia speciala kunveno en Dortmund (9.9.). Ĉeestis 26 el niaj plaĝuloj. Por la venonta jaro estas antaŭvidita kunveno en Kassel.

Auszug in deutscher Sprache: Jahresbericht

über den Zeitraum von der 21. bis zur 22. Jahresversammlung (1977 – 1978)

Organisatorisches

Für 1978 hat GEFA an IFEF für Einzel- und korporative Mitglieder 821 Beiträge abgeführt und stellt daher, wie bisher, 5 Delegierte. Die Zahl der Einzelmitglieder ging von 526 auf 504 zurück. Der Beitrag blieb unverändert.

Am 1. 1. 1978 ging das Amt des Bezirksbeauftragten in Essen vom Kollegen Bartz auf den Kollegen Retzlaff über.

Der Arbeitsausschuß kam in Saarbrücken (Oktober 1977) und Frankfurt (Main) (April 1978) mit den Bezirksbeauftragten zusammen. Im Jahre 1977 wurden 5 Sprachkurse durchgeführt.

Mitarbeit in IFEF

Am IFEF-Kongreß in Rom nahmen 85 Deutsche teil. Die deutschen Mitglieder Gießner und Kruse wurden als Präsident und Sekretärin wiedergewählt. Als Delegierte vertraten GEFA die Kollegen Brandenburg, Graß, Hans Müller, Ritter-spach und Schrapp im Kongreß. Den Text des im Kongreß gehaltenen Fachvortrages erhielten u. a. der Dokumentationsdienst der DB und mehrere Fachschulen.

Das internationale Nachrichtenblatt „Terminara Kuriero“, gegründet und redigiert von Kollegen Hartig, findet mehr und mehr ein positives Echo bei der wachsenden Zahl der Mitarbeiter des Fachwörterausschusses. GEFA nahm an 2 Sitzungen dieser Kommission in Holland bzw. Belgien teil.

Kontakte, Veranstaltungen

Die 21. Jahresversammlung fand vom 7. bis 9. 10. 1977 in Saarbrücken statt. Es nahmen 105 Mitglieder und 18 ausländische Gäste aus 4 Ländern teil. Die Hauptveranstaltung besuchten 170 Personen. Der BSW-Hauptvorstand war durch Kollegen Bayerath, Frankfurt (Main), ver-

treten. Wie gewohnt, besuchten zahlreiche GEFA-Angehörige auch andere Esperanto-Veranstaltungen, z. B. den Allgemeinen Esperanto-Kongreß in Varna (Bulgarien), den deutschen Esperanto-Kongreß, Ferienwochen, Seminare usw. GEFA führte vom 11. bis 18. 2. 1978 die Internationale Skiwoche in Grainau (Haus Hammersbach) durch mit 102 Teilnehmern aus 8 Ländern.

Die Zusammenarbeit mit dem BSW, den Gewerkschaften und Esperantoverbänden war reibungslos.

Hier muß erwähnt werden, daß mehrere örtliche Gruppen und einzelne Mitglieder seit Jahren, besonders aber in letzter Zeit, intensive Kontakte zu dem Kinderdorf „Bona Espero“ (Gute Hoffnung) in Brasilien unterhalten und durch Kleider- und Materialsammlungen sowie Geldspenden zu dessen Ausbau beitragen.

Information

Das „Bulteno“ erschien fünfmal mit 40 S. und 9 Abbildungen. Schon seit 1975 ist es nicht mehr möglich, außer in der Unternehmenszeitschrift „Wir“ noch anderweitig für Eisenbahner etwas über unsere Tätigkeit zu veröffentlichen. Das ist umso bedauerlicher, als die Übermacht der Massenmedien alle Informationen „totschlägt“, die nicht in ihre Richtung oder „Ideologie“ passen. Trotzdem soll anerkannt werden, daß „Wir“ von uns einen Bericht angefordert hat.

In den Amtsblättern sind 12 Veröffentlichungen, in Tageszeitungen mindestens 114 Artikel und Notizen über unsere Arbeit erschienen. Die Wanderausstellung ist vor über 1000 Besuchern gezeigt worden. Außerdem wurden in verschiedenen Orten Zamenhoffeste, ein Konzertabend, ein Zauberauditorium und zwanglose Zusammenkünfte veranstaltet, desgleichen öffentliche Informationen erteilt. Hier seien besonders

München, Frankfurt (Main), Herzberg (Harz), Schwelm und Bremen genannt. Einige Tausend Informationsblätter und Plakate wurden verteilt und 98 Lehrbücher außerhalb der Kurse ausgegeben.



S-ro Bayerath honoris GEFA-prezidanton nome de BSW-ĉefestraro



S-ro senatoro Brinkmann invitis okazo de nia jarkunveno fotoj: E. Kruse

Altenbetreuung

Das diesjährige Altentreffen fand am 9.9. in Dortmund statt und wurde von 26 Personen besucht. Für nächstes Jahr ist ein solches Treffen in Kassel vorgesehen. (s.auch Bericht „Emerituloj en Dortmund“).

Gießner

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Germana Esperanta Fervojista Asocio

Das geht jeden an!

Ja, das geht wirklich jeden an. Bitte lesen Sie die folgenden Zeilen recht aufmerksam, es könnte vielleicht sogar Ihr persönlicher Vorteil sein.

In unserer Vereinigung fassen wir auf freiwilliger Grundlage Menschen zusammen, die mit Hilfe einer gemeinsamen Sprache ihre fachlichen und persönlichen Kontakte zu Menschen anderer Länder vertiefen wollen. Jeder sieht ein, daß vor dem Gebrauch einer Sprache deren Erlernen notwendig ist. Weil aber Lernen nicht jedermanns Sache ist, und weil zudem das tägliche Leben den Menschen nach tausend Seiten beansprucht, darum ist es für eine Vereinigung wie die unsrige nicht möglich, die Zahl der Mitglieder in eleganter Kurve nach oben schnellen zu lassen. Keine Organisation wird von sich behaupten können, sie hätte nie Mitgliederverluste hinnehmen müssen. Aber die Neuzugänge müssen normalerweise die Verluste überwiegen, was sie jedoch seit einiger Zeit nicht tun. Und darum geht Sie, verehrter Leser, der Sie mehr sind als ein Vereinsmitglied im landläufigen Sinne, der Sie Esperantist und daher mitverantwortlich sind für die Verbreitung der Internationalen Sprache und für den Bestand unserer Vereinigung, darum also geht Sie und Sie und Sie, geht uns alle dieser Aufruf sehr viel an. Lesen Sie deshalb auch unbedingt die Worte des Präsidenten auf Seite 4 dieser Nummer: „Skuaj ciferoj, skuaj vortoj“.

Wir veranstalten einen Wettbewerb

- Teilnahmeberechtigt ist jeder, der die Vereinigung fördern will.
- Für jeden Neugeworbenen erhält der Werbende einen Anrechtschein.
- Jeder Teilnehmer, der mindestens ein neues Mitglied erworben hat, erhält einen Preis, dessen Wert sich nach der Zahl der erworbenen Personen richtet. Als Preise vorgesehen sind u. a. Befreiung vom Kongreßbeitrag in Turku, Taschenrechner, Vierfarbstifte, Bücher.

Unter denjenigen Werbern, die mehr als 5 Personen werben, erhalten die drei Besten folgende Preise:

- ① 7 kostenlose Übernachtungen für eine Person beim 31. IFEF-Kongreß in

Turku (Finnland) im Zweibettzimmer des Sommerhotels (Wert 175 DM)

- ② 1 Gutschein im Werte von 100 DM als Zuschuß zu den Übernachtungskosten in Turku.
- ③ 1 Gutschein für eine Schiffsüberfahrt bei Tage mit der Silja-Linie von Stockholm nach Turku und zurück (Wert 65 DM).

(Übertragung dieser 3 Preise an andere Personen oder Auszahlung ist möglich.)

Wie wird der Wettbewerb durchgeführt?

Sie finden in diesem Bulteno eine Beitrittserklärung mit anhängendem Anrechtschein. Weitere Erklärungen können Sie bei Ihrem Gruppenleiter oder Bezirksbeauftragten oder beim Sekretariat erhalten. Den Anrechtschein trennen Sie ab, nachdem Sie ein neues Mitglied (auch Nichteisenbahner) geworben haben, und bewahren ihn auf. Die vom Geworbenen unterschriebene Erklärung senden Sie mit der von Ihnen unterschriebenen Bestätigung über die Beitragsüberweisung ans Sekretariat ein.

Mit seiner Unterschrift verpflichtet sich der Geworbene zur Zahlung der Jahres-

beiträge zunächst für die Jahre 1979 und 1980 in einer Summe, das sind 18,— DM. An der Preisverteilung nimmt auch teil, wer Familienangehörige, Bekannte und Freunde als Simpatiuoj wirbt, auch wenn diese nicht Eisenbahner sind, unter der Bedingung, daß sie sich ebenfalls mindestens für die Jahre 1979 und 1980 zu einer Zahlung in voller Höhe der beiden Jahresbeiträge verpflichten.

Letzte Frist für die Einsendung von Beitrittserklärungen für diesen Wettbewerb ist der 28. Februar 1979 (bis zu diesem Termin müssen die Erklärungen in Münster eingegangen sein).

Die Preisverteilung wird spätestens am 10. 3. 1979 durchgeführt. Die Preisträger werden im Bulteno veröffentlicht.

Sie werden zugeben, verehrter Leser, es lohnt sich. Aber bitte, machen Sie nicht nur mit, weil es sich lohnt, sondern weil Sie helfen wollen, unsere Vereinigung zu stärken. Bitte werben Sie ganz besonders auch jüngere Menschen, und veranlassen Sie diese, möglichst nach Turku mitzukommen. Meinen Sie nicht, es käme nicht **auch** auf Sie an? Tragen Sie bitte dazu bei, daß diese Aktion ein voller Erfolg wird. GEFA-Vorstand

Aus den Gruppen

Köln/Schwelm

Rund 200 Esperantofreunde aus dem In- und Ausland folgten der Einladung der Deutschen Eisenbahner-Esperantisten und der Esperantogruppe Schwelm zur Einweihung des ESPERANTOWEGES und zum diesjährigen Herbstfest am 28. 10. zugunsten des Kinderdorfes „Bona Espero“ in Brasilien.

Anton Kronshage — Esperantogruppe Schwelm — begrüßte u. a. Bürgermeister Döring, Teilnehmer aus Schottland, Japan, Ghana, Tunesien, Jugoslawien, Belgien und den Niederlanden (die beiden letzten Gruppen mit je 12 Teilnehmern) bei der Einweihung des Esperantoweges. Die Initiative geht hauptsächlich auf unseren Kollegen Heinz Schindler zurück. An der gleichen Stelle wurde 1967 bereits der Zamenhof-Weg eingeweiht.

In seiner Begrüßungsansprache bekannte

sich der Vertreter der Stadt, Bürgermeister Döring, in seiner in deutscher Sprache und in Esperanto gehaltenen Rede, zur Bedeutung der Internationalen Sprache auf dem Gebiet der Völkerverständigung und des erhofften Weltfriedens. Für GEFA und den Bezirk Köln richtete der 2. Vorsitzende Wilhelm Graß Grußworte an die Teilnehmer und dankte den Initiatoren für die beispielhaften vom Erfolg gekrönten Bemühungen 2 Straßen, die miteinander verbunden sind, mit Bezeichnungen aus der Esperantoidee zu benennen (bisher in Deutschland nur in Frankfurt/Main bekannt).

Nach den Grußworten der ausländischen Freunde erinnerte Dr. Bormann als UEA-Vorstandsmitglied an die Bedeutung der Namensgebung für Schwelm zur Hebung des Bekanntheitsgrades in der Welt durch Veröffentlichung der neuesten Esperanto-Straßenbenennung in der einschlägigen Esperantoliteratur sowie in Katalogen und Verzeichnissen. Frau E. Bormann richtete als Präsidentin des

Deutschen Esperanto-Bundes und Herr Behrmann als Beauftragter der Esperanto-Pädagogen Grußworte und Glückwünsche an die Stadt und die Esperantogruppe für den sichtbaren Erfolg.



Auch diese Japanerin und ihr Kind (lk. i. Bild) waren dabei, als Bürgermeister Döring den „Esperantoweg“ in Schwelm einweihte. foto: Westfälische Rundschau

Beim gemeinsamen Kaffeetrinken im Evangelischen Gemeindehaus begrüßte der Hausherr Pfarrer Greiling die Esperantofreunde, die sich am Kaffee aus Bona Espero und am Kuchen – von den Esperantofrauen gestiftet – erfreuten. Der Reinerlös von 1824, – DM konnte Bona Espero zur Verfügung gestellt werden. Die Singgruppe „Erzgebirge“ aus Wuppertal führte ihre heimische Klöppelkunst vor und erfreute mit Liedern aus der ehemaligen Heimat. Mit großem Interesse wurde der Lichtbildervortrag über Bona Espero von Elfriede Kruse angenommen.

Herzlichen Dank allen Freunden in Schwelm für ihre Mühen.

Lesen Sie auch den Bericht v. Hz. Schindler in IF.

Hannover/Bremen:

Esperanto-kurso kun pli ol 20 partoprenantoj sukcese komenciĝis post la informvespero okaze de la jarkunveno.

La 8an de Novembro okazis prelego kun lumbildoj pri „La eterna Romo“ (ĉirkaŭ la IFEF-kongreso 1978). La 6an de Decembro okazos Zamenhof-festo. Por Bona Espero sendis la grupo la enhavon de la ŝparujo kiel kristnask-donacon.

63a UK de Esperanto en Varna

La dua plej granda kongreso kun pli ol 4400 kongresanoj el pli ol 50 landoj. „Heroldo“ raportis sub la titolo „Fakaj kunvenoj“:

Fervojistoj

Ĉiam fervoraj

En kontaktkunveno de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, kiun prezidis la prez. de bulgara IFEF-sekcio, G. Dolapĉiev, kaj D-ro F. Phersy, estis prezentita raporto pri Kongreso en Romo kaj financa raporto. Diskutis A. Menabene (Italio) pri interparlamentara grupo, M. Gjivoje (Jugoslavio) pri informado pere de fervojaj gazetoj kaj horaroj, H. Barks (Anglujo) pri instruado dum la kongresoj, E. Serban (Rumanio) pri Esperantogrupoj en Braŝovo k. a.

Nekrologoj

Nur kelkajn monatojn post la morto de nia membrino Hedwig Lemme, nun la 19an de Septembro 1978 ni perdis la edzon, nian longjaran membron

Alfrid Lemme

el Ludwigshafen. Li esperantistiĝis jam antaŭ la jaro 1933 kaj estis membro de GEFA kaj IFEF ek de la refondiĝo. Ĉiam li estis fervora Esperantisto kaj vizitis preskaŭ regule IFEF-kongresojn kaj GEFA-jarkunvenojn. Ĝis la lasta momento li interesiĝis je nia afero. Li ripozu en paco.

Post longa kaj grava malsano mortis la 6an de Oktobro 1978 nia longjara aktiva membro

Fritz Behnke (71)

el 4300 Essen 1, Holsterhauserstrato 28. Ripozu en paco.

Al la familianoj ni esprimas sinceran kondolencon. GEFA-estraro

31. IFEF-Kongreß in Turku/Finnland

15. – 21. Juni 1979

Die Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten (GEFA) sind schon jetzt herzlich zur Teilnahme am nächsten Verbandskongreß in Turku/Finnland eingeladen. Einzelheiten über die Anmeldeformalitäten und das Programm erscheinen im Internacia Fervojisto. Der Kongreßort wird im nächsten BULTENO vorgestellt. Die nachfolgenden Informationen sollen die Reisevorbereitungen erleichtern.

Drei Wegevorschläge mit Bahn und Schiff

a) Der gebräuchlichste Weg
Puttgarden – Kopenhagen – Stockholm – Turku, davon mit Schiff von Puttgarden nach Rödby Faerge, von Helsingör nach Helsingborg und von Stockholm nach Turku. Reisedauer ab Puttgarden 25 Stunden 25 Minuten für 1 152 km.

b) Der längere Weg
Travemünde – Malmö – Stockholm – Turku, davon mit Schiff von Travemünde nach Malmö und von Stockholm nach Turku. Reisedauer ab Lübeck-Travemünde Skandinavienkai 33 Stunden für 1 157 km.

c) Der bequemste Weg
Travemünde – Helsinki – Turku, davon mit Schiff von Travemünde nach Helsinki. Reisedauer ab Lübeck - Travemünde Skandinavienkai 26 Stunden 14 Minuten für 1 323 km. Abfahrt jeden zweiten Tag.

Fahrtkosten

Weg a) Aktive Bedienstete zahlen für die Seestrecke Stockholm Turku 33,10 DM (Einheitsklasse). Wer es billiger haben will, kann einen ermäßigten Fahrschein bei den Büros der Schifffahrtsgesellschaften Anfarlytgs Aktiebolaget Bore oder Stockholms Rederiaktiebolag Svea, beide in Stockholm lösen. Familienangehörige und Pensionäre zahlen 94,20 DM (2. Kl.) bzw. 124,10 DM (1. Kl.)

Weg b) Aktive Bedienstete zahlen für die Seestrecke Travemünde – Malmö 68,- DM (Einheitsklasse) und für die Seestrecke Stockholm – Turku wie bei Weg a). Für Pensionäre und Familienangehörige beträgt der ermäßigte Fahrpreis 147,- DM (2. Kl.) bzw. 170,- DM (1. Kl.).

Weg c) Aktive Bedienstete zahlen für Weg c) Aktive Bedienstete bezahlen für die Seestrecke Travemünde – Helsinki ab 163,- DM (Einheitsklasse). Senioren erhalten eine Ermäßigung von 25 %. Familienangehörige zahlen für die Gesamtstrecke 169,50 DM (2. Kl.) bzw. 172,80 DM (1. Kl.).

Kabinenzuschläge

Seestrecke Stockholm - Turku ab 15,- DM (Tagesfahrt) und 31,- DM (Nachtfahrt). Seestrecke Lübeck - Travemünde Skandinavienkai – Malmö ab 8,- DM (Tagesfahrt) und 17,- DM (Nachtfahrt). Seestrecke Lübeck - Travemünde Skandinavienkai – Helsinki ab 34,- DM (Saisonzuschlag).

Vorkongreß in Kopenhagen/Rückkehr

Unsere Kollegen in Kopenhagen laden zu einem geselligen Abend am 13. Juni 1979 ein. Preis für Essen und Getränke 50 – 60 Dkr. Übernachtungsmöglichkeit im Hotel Hebron (Bahnhofsnahe) für 95 Dkr einschl. Frühstück. Gemeinsame Abfahrt nach Stockholm am 14. Juni gegen 9 Uhr. Weiterfahrt mit Schiff in Zweibettkabine. Warmes Abendessen, Ankunft in Turku am 15. Juni gegen 8 Uhr (OEZ). Gemeinsame Rückkehr am 22. Juni, wieder mit Schiff Turku–Stockholm, Abfahrt gegen 9.30 Uhr, Weiterfahrt ab Stockholm mit Liegewagen nach Kopenhagen, Ankunft dort um 6.36 bzw. 8.21 Uhr (23. Juni). Pauschalpreis (ohne Leistungen in Kopenhagen) 400 Dkr.

Anmeldevordrucke sind bei den Bba anzufordern.

Information und Anmeldung für den Vorkongreß in Kopenhagen durch:
G. Thuesen, Langekaervej 40,
Dk-2750 Ballerup, Telef.: 02 97 76 21

Alle Zeit- und Preisangaben sind ohne Gewähr nach dem Stand vom 1. 11. 1978. Deutschsprachige Prospekte sind kostenlos erhältlich beim Finnischen Fremdenverkehrsamt, Rothenbaumchaussee 11, 2000 Hamburg 13 sowie beim Finnland Informationsbüro, Franzstraße 5/1r, 8000 München 40.

W. B.

Emerituloj en Dortmund

La 9an de Septembro 1978 kunvenis en restoracio „Union-Bräu“ en Dortmund 26 membroj el la norda parto de Germanio. Eĉ kolego Ludwig Heintz de Berlin ne timis la longan vojaĝon. Senioroj oni ne plu rajtas nomi tiujn membrojn, ĉar inter ili troviĝas kolegoj, kiuj laŭ aĝo ankoraŭ ne apartenus al tiu kategorio de fervojistoj.

La salonoj en „Union Bräu“ estas imponaj kaj luksaj, sed ankaŭ la menuo kaj la komuna kafotablo kontentigis la gajan rondon. Kolego Retzlaff, komisiito de la distrikto Essen, bone elektis proksime de la stacidomo tiun rendevuan lokon kaj meritas pro tio apartan dankon.

Dankon ankaŭ meritas kolego Schrapp, la GEFA-sekretario, kiu dum mia foresto transprenis la taskon, inviti la koncernajn membrojn.



Niaj emerituloj en Dortmund

foto: E.Kruse

La BSW-ĉefestraro, kiu ĉiujare disponigas certan sumon al tiu aranĝo, ne vane elspezas la monon, kvankam la senkostaj manĝoj certe ne estas la alloga punkto por la renkontiĝo. Videble ĉiuj ĝojis, revidi unu la aliajn, kelkaj post longa tempo. Kiom ili havis por rakonti reciproke! Komunaj interesoj nodis amikajn kaj familiajn interrilatojn. Ne mirige, ĉar nia komuna lingvo kreas apartan senton por komuneco. Estis malfacile interrompi la gajajn babiladojn. Tamen ili lasis sin forkonduki al Brazilo, kiam mi rakontis kelkajn detalojn de mia vojaĝo tien kaj pri la restado en Bona Espero. Spontane ili kolektis preskaŭ 300 GM por kontribui

al la unika kaj esperplena agado de niaj geamikoj Grattapaglia. Certe ili tre ĝojas pri ĉi tiu konvena subteno.

Dankon al ĉiuj pro la amika atmosfero. La venonta aranĝo antaŭvideble okazos en Kassel, en aŭtuno 1979.

E. Kruse

Esperanto-Nachrichtendienst
Mit dem Ableben von Ludwig Pickel, Nürnberg, wurde das Erscheinen des Nachrichtenmagazins „Pilo-Press“ eingestellt. Die Ludwig-Zamenhof-Gesellschaft bietet als Ersatz „Esperanto aktuell“ zum Jahresabonnement von 18,— DM an. Den Bücherdienst hat der ehemalige Bba Augsburg Hermann Schmid, Steppach, übernommen. Bei Bestellungen bitten wir unseren ehemaligen Kollegen zu berücksichtigen. Adresse: Bayerische Esperanto-Liga, Seitzstr. 14, 8900 Augsburg. Außerdem wird bei genügend Abonnenten die Wochenzeitschrift „Semajno“ erscheinen, die nicht über Esperanto, sondern wie ein Wochenmagazin in der Internationalen Sprache über Ereignisse in der Welt berichtet. Der Bezug wird empfohlen. Fordern Sie ein Probeexemplar zum Preis von 3,— DM (Überweisung auf Postscheckkonto Nürnberg 650 92—858) bei Stefan Maul, Singerstraße 1/III, 8900 Augsburg, an. Gruppen erhalten 10% Rabatt bei Bestellung von mehr als 5 Exemplaren.

De la „Einführungskurs, Esperanto eine lebendige Sprache“ kaj „Konversacia Kurso“ ekzistas ankoraŭ sufiĉe granda stoko.

La libroj estas taŭgaj por aŭtodidakta kaj kursa lernado de Esperanto. La prezoj estas por la unua libro 5,— gm kaj la dua 6,— gm. Ambaŭ kostas 10,— gm.

Bonvolu mendi ilin ĉe BAmtn Schrapp, 4400 SV Nord (Gruppe BVA) Münster (Westf.).

Mitgliederzugang

Als neues Mitglied begrüßen wir Karl Heinz Kersting, Büro P der BD Essen.

Redaktfino por n-ro 1/79 estas la 15.1.1979